The weather was fine and the terrific heat I was told to expect was not experienced at all. In the shade it was always cool and there was always a breeze. No window-screens are used or needed in Bologna or in Rome for there are no flies, mosquitos or other insects. The cities are clean but the traffic is terrific. Thousands of bicycles of every kind, half of them motorized, go through the streets at great speed. Enormous trucks, autos, many of them very small, make street-crossing hazardous. However, I did not see an ambulance or hear a siren or see a fire-apparatus or a funeral all the time I was in Italy.

Yes, Esperanto is very much alive. The rest of the world is not going to wait for the great powers to grudgingly accept Esperanto. The other countries, who know that they can not hope to have their native tongues become universal, are going right ahead to solve the language problem.



AU REVOIR—Mrs. Cora L. Fellows of Port Richmond waves "Goodbye" before boarding plane to Esperanto Congress in Italy. (*Staten Island Advance*.)

NEOLOGISMOJ EN ESPERANTO

D-ro William Solzbacher

Membro de la Akademio de Esperanto

ESPERANTO estas vivanta kaj tial ankaŭ kreskanta lingvo. Ĝi daŭre "sorbas" internaciajn vortojn el la ŝanĝiĝanta vivo de la scienco, kulturo kaj politiko, senĉese naskas kunmetitajn formojn kaj pliriĉiĝas per novaj radikoj. La maniero, en kiu tio okazas, kaj eĉ pli la rapideco de la evoluo prezentas problemojn, kiuj ne ĉiam estas bone komprenataj kaj pri kies solvo povas ekzisti diversaj opinioj.

Vortaroj en ĉiuj lingvoj havas la taskon "registri" vortojn ekzistantajn kaj doni rekomendojn pri ilia uzo. Esperanto-vortaroj tamen ofte ne kontentiĝas pri tiu rolo, sed prezentas kaj proponas radikojn, kiujn ankoraŭ neniu — aŭ preskaŭ neniu — uzis. Ili tion faras en la nomo de la "logiko", de la "lingvo-normigo" aŭ de la "neceseco pliriĉigi la lingvon". Tiu fakto preskaŭ ĉiam elvokas kritikojn aŭ eĉ pasiajn atakojn. Ĝi ankaŭ iomete malhelpas la uzadon de tiuj vortaroj.

En la pasinta jaro, kiam aperis la *Suplemento* al la *Plena Vortaro* (kompilita de Profesoro Gaston Waringhien), la *Boletín* (Bulteno) de la Hispana Esperanto-Federacio publikigis (en Oktobro 1954) recenzon de Luis Hernández. Li diris, ke li ne povas "honeste rekomendi la balaston, kiun oni alkroĉis al la bonega Plena Vortaro en ĝia kvara eldono". En sian artikolon li enmetis leteron — spicitan per neologismoj el la *Suplemento* — ricevitan de unu el siaj amikoj. Jen ĝi estas:

"Inĝenia ogreto: Povra kaj trista peticio estas la mia, kaj eble sterila; sed mi ne avanco en la basa kaj turpa vertiĝo korodi, devaluti kaj diskrediti la feblan ESPERANTON (jes, per majuskloj), prodigante pletores kaj orgojle la partikularan selekton, leĝere faritan ne de obskura vagabonda reformatoro, sed de ĝirema direktivestro, kiu ascendis sen truko, spano post spano, lante kaj tarde, kaj nun bone dominas la lingvon; tamen laŭŝajne kontaĝita de la piruetoj faritaj de kamuflita maskerado de pigraj uzurpatoroj de la vera profesio de literatoro, antaŭ ankoraŭ ne unu trimestro, eksponis kaj lanĉis skeĉon de eksplicitaj kaj hastaj esperanteskaj fivortoj. Mi estas poltrona kaj timida, sed plenumas la duran devon molesti vian atenton per horora desfilo de nur kurta primico de tiaj *tajnaj* fiaskendaj vortaĉoj, neuzitaj en la paseo, kun reklamacia peto al masklaj esperantistoj por tuja prohibicio, ĉiu en sia demarkacio, sen rekviemo nek humidaj suspiroj tepidaj, ĝis decidis oportuna plebiscito. Via olda filibustro, *Ernesto Guillem*."

S-ro Hernández protestis kontraŭ la "lavango" da neologismoj en la *Suplemento* kaj eĉ parolis pri "kvina kolono celanta detruiri de interne nian lingvan unuecon." Li diris, ke tia amaso da neologismoj "cetere kreas konfuzojn kaj ĝenojn al la mezkapablaj Esperantistoj, kiuj fakte estas la plej nombraj elementoj en nia popolo."

Al Luis Hernández respondis en la *Boletín* de Aprilo 1955 Donald R. Broadribb el Usono, prezentante la argumentojn de la neologismemuloj en forta, eĉ ekstrema, formo. "Ĉu ni estas barbaroj, kiuj devas balbutadi per kelkcent vortoj?", li skribis. "Kial estas malpermesate, de tiuj protestemaj personoj, havi riĉan vortaron? Ĉu estas nur akcidento, ke la plej kulturaj lingvoj de la mondo estas ankaŭ la plej grandaj?... Kial al verk-

anto estu malpermesate diri *diktionario*, vorto uzata en ĉiu okcidenta lingvo, nur ĉar iu kapriculo preferis traduki germanan kombinorton (*vortaro*), kiu povas egale signifi la tutan lingvon?... Kial en Esperanto neniu rajtu *developi* ideon, sed nur ĝin *disvolvi*, kvazaŭ temus pri fadenoj vinditaj ĉirkaŭ stangeto?"

S-ro Broadribb havas interesan kaj diskutindan argumenton, sed malbone elektis siajn ekzemplojn. *Vortaro* ne estas analoga al la germana *Wörterbuch* (kiu estas *vortlibro*), sed sekvas la slavan kaj latinan ekzemplon. En rusa lingvo *slovo* estas *vorto*, *slovar'* *vortaro*. *Slovar* en slovena, *slovník* en ukraina, *slovník* en ĉeĥa kaj slovaka, *slownik* en pola, *reĉnik* en serbo-kroata kaj bulgara lingvoj estas formataj ekzakte kiel *vortaro* en Esperanto. La latina *dictionarium*, de kiu devenas la angla, franca, itala, hispana kaj portugala vortoj, en laŭvorta traduko estas *diraĵaro*, do ankaŭ formata kiel *vortaro* en Esperanto. Pro diversaj kaŭzoj *diktionario* ne estas taŭga vorto en Esperanto, sed ja ekzistas samsignifa oficiala vorto *leksikono*. (La difino de *leksikono* en la Plena *Vortaro*, "mallonga vortaro sen ekzemploj", estas malbona; la *Vortaro de Esperanto* de Kabe simple egaligas la du vortojn. Se la franca *lexique* ofte estas uzata por malgranda vortaro, la angla kaj germana *lexicon* preskaŭ ĉiam signifas tre dikan vortaron aŭ enciklopedian verkon). — Pri *disvolvi* kaj *developi* oni povus diri, ke ili havas la saman etimologion kaj ke la franca *développeur* fakte signifas ankaŭ "disvindi fadenon"; ĝi estas la malo de *enveloppeur*, de kiu venas la angla vorto *envelope* (koverto).

Sed ni revenu al la baza argumento de Donald Broadribb: "Lingvo devas posedi ĉiun vorton necesan. Por ĉiu aparta ideo devas esti aparta vorto aŭ formo. Estas falsa ŝparo, ŝpari vortojn, rifuzante permesi al verkisto, esprimi tion, kion li volas, ĉar oni ne volas plian vorton."

Ĉu Sinjoro Broadribb estas prava aŭ malprava? La respondo ne estas facila kaj ne povas konsisti en simpla *jes* aŭ *ne*. Se mi volus doni proksimuman kaj mallongan respondon, mi dirus, ke mi konsentas pri la unua frazo kaj la tria frazo en la citaĵo, sed ne pri la dua.

Esperanto devas esti kapabla esprimi ĉion, sed ĝi ne bezonas kaj ne povas havi apartan vorton por ĉiu aparta vorto aŭ ideo en ĉiu nacia lingvo.

Neniu lingvo havas apartan vorton por ĉiu aĵo aŭ ideo. Eĉ la plej "riĉaj" lingvoj kelkfoje estas "malriĉaj". Ekzemple la angla lingvo, kies vortaro enhavas centmilojn da vortoj, uzas la saman vorton *law* por *lego* kaj *juro*, la saman vorton *fire* por *fajro* kaj *brulego*, la saman vorton *step* por *paŝo* kaj *ŝtupo*. Angle parolantaj personoj kelkfoje estas blindaj pri tiaj diferencoj, kun rezulto, ke antaŭ kelkaj jaroj *Universala Esperanto-Asocio* titolis fakvortareton *Leĝa Terminaro* (anstataŭ *Jura Terminaro*) kaj ke oni kelkfoje aŭdas la strangan vorton (tute nekompreneblan al neanglalingvanoj) *legisto* anstataŭ *advokato* aŭ *juristo*.

Aliflanke ĉiuj lingvoj, eĉ la plej "primitivaj", estas treege "riĉaj" je terminoj, kiuj rilatas al la vivmaniero de la popolo. En la *aleuta* lingvo — mia informfonto estas la gramatiko kaj vortaro de Richard H. Geoghegan, unua Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko — ekzistas vortoj kiel *ixsgiq* ("loko, kie marleonoj eniras la akvon"), *nuxsxaq* ("marleona stomako entenanta parte digestitajn fiŝojn, manĝata kiel frandaĵo"), aŭ *qigadaĝinan* ("personoj loĝantaj oriente de la insulo Unalaska"). Nek la angla lingvo nek Esperanto povas traduki tiajn vortojn de la "primi-

tiva" aleuta lingvo sen klarigaj frazoj por doni la ĝustajn signifojn.

Aŭ pripensu la kazon de la riĉega araba lingvo. En ĝi ekzistas proksimume mil vortoj, kiuj signifas *kamelon*, mil vortoj, kiuj signifas *ĉevalon*, kvincent vortoj, kiuj signifas *glavon*, kvincent vortoj, kiuj signifas *tigron*. Ĉiuj havas iomete malsaman senconuancon. Kiu povus plene traduki tiajn nuancojn en alian lingvon? La fama *Fiqhul-Lugbat* ("Filozofio de la Vortaro") de Tha'álabi klarigas kelkajn el la delikataj nuancoj de la araba vorttrezoro. Ekzistas ekzemple vortoj esprimantaj la gradojn de dikeco de virino. Se virino estas modere dika kun delikataj proporcioj inter la korpopartoj, ŝi estas nomata *rebahlab*. Se ŝi estas pli dika, sed ne sufiĉe dika por esti malbela, ŝi estas *sebahlab*; se ŝi estas dika kaj malbela, sed ne tre, ŝi estas *mufazah*; se ŝi estas treege dika, ŝi estas *ifdaĝ*. Bela virino estas nomata *ĝamilab* aŭ *vazi'ab*; se ŝi estas tiel nature bela, ke ornamaĵoj nenion aldonus al ŝia beleco, ŝi estas *ĝhaniab*; se ŝi estas bela kaj indiferenta pri ornamaĵoj, ŝi estas *mi'tal*; se ŝia beleco estas brilega, ŝi estas *vasimah*; se ŝi estas abunde bela, ŝi estas *qasimah*, kaj se ŝi estas pli bela ol iu el tiuj vortoj povas esprimi, ŝi estas *rav'a*. Ŝajnas, ke poetoj devus lerni la araban lingvon!

Se Esperanto devus esti kapabla traduki ĉiun vorton en ĉiu nacia lingvo per aparta vorto aŭ esprimi ĉiun koncepton en ĉiu nacia kulturo per unu vorto aŭ mallonga frazo, ĝi devus esti senfine pli riĉa – kaj senfine pli malfacile lernebla – ol ĉiu nacia lingvo. Sed ni neniam forgesu, ke unu el la plej gravaj kvalitoj de Esperanto estas ĝia facileco, bazita sur severe limigita nombro da radikoj kaj la uzo de kunmetitaj vortoj kaj de genia sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj. La "malriĉeco" de la baza radikaro estas unu el la esencaj kvalitoj de Esperanto. La konservado de tiu kvalito necesigas ŝparemon kaj singardan sintenon al neologismoj ne nepre necesaj. La juĝo pri tio, kio estas "nepre necesa", ofte estas malfacila, sed mi emas opinii, ke en dubaj kazoj estas pli bone, ne akcepti la neologismon.

Ofta argumento estas, ke granda nombro da neologismoj estas necesa en la literatura uzo de Esperanto. D-ro Kolomano Kalocsay bone prezentis ĝin en sia artikolo pri *Neologismoj* en la *Enciklopedio de Esperanto*: "Rilate al la neologismoj kolizias du vidpunktoj inter si kontraŭaj: tiu de la simpleco kaj facileco kaj tiu de la riĉeco kaj literatura taŭgeco de la lingvo. La kolizio ŝajnas nerepacigebla, ĉar nek la propagando povas rezigni pri la granda altirforto de la facilo kaj simpla, nek la literaturo pri la esprimforto kaj vortriĉo, sen kiuj vera literaturo, transdonanta ne nur la nudan penson, sed ankaŭ delikatajn nuancojn, metaforajn vort-aplikojn, duonklarajn aludojn entenantajn de vortoj, estas kaj restas nur pia revo. La problemo ŝajnas solvebla nur per la apartigo de la 'poeziaj vortoj', t. e. vortoj uzataj nur en la alta literaturo... Per tio la vulgara lingvo povus resti neembarasata de la literatura lingvo-evoluo."

Ni iomete konsideru tiun argumenton. Sendube poeto kaj literatura verkisto havas la rajton esprimi sin en formoj diferencaj de tiuj de komerca letero, scienca traktato aŭ kongresraporto. En iu senco sciencistoj, komercistoj, inĝenieroj, bankistoj, filozofoj kaj tiel plu parolas apartajn "lingvojn". Oni povas eĉ diri, ke ĉiu poeto – ĉu en Esperanto, ĉu en la angla, ĉu en la hotentota lingvo – parolas sian propran, tute individuajn "lingvon". Tamen ĉiu uzanto de Esperanto devas respekti ĝiajn bazajn

principojn, inter kiuj ŝparemo pri radikoj estas unu el la plej gravaj. La poezia lingvo povas eluzi la specialajn kvalitojn de Esperanto, precipe la senfinan trezoron de kunmetitaj vortoj. Mi ne diras, ke neologismoj devas ĉiam esti evitataj, sed ili devus esti uzataj modere kaj singarde. Se oni enkondukus ilin amase, oni kreus du tute malsamajn Esperantodialektojn. Tiuj, kiuj volus legi la "altan literaturon", ne nur devus lerni multajn novajn radikojn, sed devus tuj poste "mallerni" ilin, por ne enmeti ilin en la ĉiutagan ("vulgaran") lingvon.

Kelkaj el la "literaturaj" neologismoj estas kritikindaj ankaŭ pro aliaj kaŭzoj. La vorto *bunta* (diverskolora, varikolora), ekzemple, kiun mi legis en artikoloj tute ne apartenantaj al la "alta literaturo", ne estas internacia, sed troviĝas nur en la germana kaj nederlanda lingvoj. Sed la germana *bunt* kaj la nederlanda *bont* havas pli vastan sencon ol la proponata Esperanto-radiko *bunt-*, ĉar en tiuj naciaj lingvoj ĝia signifo estas ne nur *multkolora* kaj *diverskolora*, sed ankaŭ simple *kolora*, t.e. nek blanka nek nigra. La vorto *bunta* certe estas belsona kaj mallonga, sed kiom da konfuzo ĝi povas kaŭzi!

Ŝajnas al mi, ke kelkaj el niaj literaturistoj groteske troigas la "necesecon pliriĉigi nian lingvon." En la nuna fazo de la evoluo ni devas gardi la simplecon kaj facilecon de Esperanto kaj akcepti neologismojn nur, kiam ili estas plene internaciaj aŭ nepre necesaj pro iu nova fakto en la internacia vivo. Kiam okazos io, kio multe pligrandigos la praktikan uzon de Esperanto, eble eĉ subite, tiam estos malfacile eviti pli rapidan ritmon en la enkonduko de neologismoj. Eĉ tiam ni devos esti singardaj. En la nuna situacio estas regulo de elementa saĝeco, preferi plenan elĉerpadon de la "interna riĉeco" de Esperanto al nekritika amasa akceptado de neologismoj malfacile digesteblaj.

SCIENCA REVUO aperas kvar-foje jare per grandaj kajeroj (entute 160 paĝoj), kaj pritraktas sciencajn temojn de ĉiuj fakoj de la vivo en formo facila kaj interesa. Ne pensu ke ĝia enhavo estas specialisma, pure teknika aŭ nekompreneble scienca. Temoj el la sciencoj – naturaj same kiel sciencaj – estas traktataj, sed ankaŭ ĝeneralaj kontribuadoj pri kulturaj temoj aperas en ĝi. En *Scienca Revuo* aperas ankaŭ komunikoj de la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). *D-ro F. J. Belinfante* de Universitato Purdue estas la Usona reprezentanto. Ni konsilas, ke ĉiuj Esperantistoj abonu al tiu tre interesa gazeto. Jarabono estas nur \$1.50. Mendu ĝin por 1956 tuj nun de EANA.



Ĝojan Kristnaskon
Feliĉan Novjaron

ESPERANTA KRONIKO

En "Soldata Kampo" (Soldier's Field), Chicago, sepdek-kvin soldatoj de la 47-a Bataliono manovris antaŭ la publiko kaj respondis al ordonoj donitaj en Esperanto. "Dekstren!" kriis Serĝento Maxie Yates, kaj sepdek-kvin verde vestitaj soldatoj turnis sin dekstren. La soldatoj estas membroj de la Grupo "Aggressor", parto de la Usona armeo, kiu oficiale uzas Esperanton. Artikolo pri tio aperis en Septembro en la ĵurnalo "Chicago Daily News".

Vizitanto al la Centra Oficejo lastatempe estis *Fernand Trudel* el urbo Kebeko, kiu diversmaniere laboras por progresigo de Esperanto inter Franc-Kanadanoj.

Profesoro F. C. Neumann raportis pri kurso de Esperanto dum la aŭtuna studsezono en Kolegio Elizabethtown. Lernantoj en la kurso ricevas oficialajn kredit-poentojn pro la studado de Esperanto.

"Scripps-Howard News", bulteno por dungitoj de la granda informkompanio, en la oktobra numero presis artikolon pri nia samideano *J. H. Schackmann* kaj lia flankokupo Esperanto.

Graham E. Fuller, juna Usona studento, kiu ĉi-somere ĉeestis la Universalan Esperanto-Kongreson skribis jene pri sia sperto: "La Kongreso estis unu el la altpunktoj de la tuta vojaĝo. Mi miris pri la grandaj kaj diversaj uzoj de la lingvo... Se mi havis iajn dubojn pri la uzebleco aŭ taŭgeco de la lingvo, ili tute disiĝis. La fakto de konstanta konversacio, filmoj, prelegoj de tre alta nivelo, teatraĵoj, kantoj, ktp., montris al mi la efikecon de Esperanto. Mi vere ne povas esprimi kion la sperto signifis por mi."

El St. Paul, Minesoto, *F-ino Josephine Downey* raportis, ke 15 lernantoj en kurso de la latina lingvo daŭre studas Esperanton. Ili mem elektis lerni la interlingvon aldone al la studado de la latina lingvo.

Belajn poŝtkartojn pri Sicilio kun teksto en Esperanto faris *S-ro J. S. Boscarino*, Esperanto-Delegito en tiu parto de Italujo. Li mem desegnis la kartojn kaj bildigis la fakton, ke Sicilio estas "Lando de Suno".

Paul J. Mimplitsch raportis, ke daŭre funkcias Esperanto-Klubo por junuloj en lia alternejo en Philadelphia. La junuloj kune studas per legado de dialogoj en la libro "Practical Grammar" de I. K. Reed.

En la "Fairview Beacon", monata ĵurnalo de la lernantoj en la alternejo Farmington, Konetikuto, aperis bona artikolo pri Esperanto skribita de nia juna samideano *John Schilke*. John estas Help-Redaktoro de supre menciita ĵurnalo.

La nova filmo "Special Delivery" de la filmfarejo Columbia, nun montrata en kinejoj tra Usono, entenas diversajn dialogojn en Esperanto. La filmo rakontas pri la komplikajoj, kiuj sekvas el forlaso de infaneto en ĝardeno de Usona ambasadorejo. Kaj ĉar la ambasadorejo situas en "iu lando malantaŭ la fera kurteno" dialogoj inter civitanoj de tiu lando estas en Esperanto. La heroino ankaŭ kantas ĉarman lulkanton Esperante.

Esperanto-Asocio de Nov-Jersio larĝskale reklamas Esperanton dum sia aŭtuna laboro. Jen trafa afiŝo, kiun la Asocio faris por reklami pri komenco de siaj kursoj. Oni lokigis la afiŝojn en butikoj, bankoj, lernejoj, bibliotekoj, ktp. En Oktobro komenciĝis sep kursoj en la oficialaj programoj de Lernejoj por Plenkreskuloj en jenaj urboj: Cranford, East Orange, Elizabeth, Millburn, Morristown, Passaic kaj Newark. Instruistoj de la kursoj estas: *Elsie Yungbans, Marie Maffey, Constance Davis, J. Henry Kruse, Donald Walton kaj Helen Walton*. Aldone al la supraj kursoj S-ino Davis instruas kurson en la Centra YMCA, Orange, N. J. Entute tre laŭdinda kaj imitinda laboro de la Esperanto-Asocio de Nov-Jersio.

TAKE AN ADULT-SCHOOL COURSE
THIS FALL IN
ESPERANTO

*The Easy World Language...
Easy To Learn... Easy To Use*

Only One Night A Week For 10 Weeks... 2-Hour Sessions
Meet Interesting People... Enjoy Mastering This Language
Approved By UNESCO (United Nations)

THERE'S A COURSE CONVENIENTLY NEAR YOU:

School	Beginning	Evening	Fee
MORRISTOWN HIGH	OCT. 3	MONDAY	\$10
MILLBURN HIGH	SEPT. 29	THURSDAY	3
CRANFORD HIGH	OCT. 4	TUESDAY	3
PASSAIC HIGH	OCT. 6	THURSDAY	10
EAST ORANGE HIGH	OCT. 4	TUESDAY	3
ORANGE, YMCA	OCT. 5	WEDNESDAY	3
ELIZABETH, BAITEN HIGH	OCT. 5	WEDNESDAY	3
NEWARK, WEST SIDE HIGH	OCT. 3	MONDAY	3

SIX MILLION PEOPLE KNOW ESPERANTO
...DO YOU?

Kursanoj en la nova Esperanto-Kurso de *J. Henry Kruse* centprocente aliĝis al EANA. La kurso okazas ĉiusemajne en la regula programo de la Lernejoj por Plenkreskuloj, Morristown, N. J.

J. Trytiak informis nin, ke en Oktobro estis iniciatita restarigo de Esperanto-Rondo en Philadelphia. Provizora estraro estas: *D-ro Charles Sass*, Prezidanto, kaj *Edwin C. Harler, Jr.*, Sekretario-Kasisto.

En la lukse presita kongreslibro de la Pola Nacia Unio, kies 15-a kongreso okazis lastatempe en Passaic, Nov-Jersio, aperis kvaronpaĝa reklamo pri Esperanto kaj EANA. Nia samideano *Andrew I. Rogus* aranĝis pri la presigo de reklamo en la pola lingvo.

La Japana Esperanto-Instituto Petas Helpon de Vi

"Por memori la 50-jaran jubileon de la Japana Esperanto-movado kaj utiligi la okazon por manifesti la utilecon de nia lingvo, ni projektas diversajn eventojn dum la jaro 1956 kaj interalie ni organizos en Majo ekspozicion de infanaj bildgazetoj de la mondo kolektitaj per Esperanto. Ni estas certaj, ke la ekspozicio havos grandan publikon, ĉar ni intencas okazigi ĝin en multevizitata galerio.

"Por sukcese aranĝi la ekspozicion, ni esperas fervoran kunlaboron de niaj eksterlandaj amikoj. Ni estus do tre dankaj, se vi bonvolus helpi nin sendante al ni po 1 ekz. de kelkaj porinfanaj periodaĵoj (monataj, dumonataj, semajnaj, ktp.) bele ilustritaj – por infanoj de kindergarteno kaj de malaltaj klasoj de elementa lernejo – unuarangaj en via lando.

"Ankaŭ neperiodajn bildlibrojn ni ricevos kun ĝojo kaj danko. Ni rekomencos vin per infangazetoj eldonitaj en Japanujo aŭ (se vi preferus) per niaj eldonaĵoj. Ni esperas, ke vi plenumos nian peton laŭeble plej baldaŭ, ĉar poŝtaĵoj bezonas 2-3 monatojn por veni al Japanujo per ŝipo. Sendu tiujn al *Plenumkomitato de Jubileaj Eventoj, Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati 1-13, Tokio, Japanujo.*"

Ĉu vi jam renovigis vian membrecon en EANA por la jaro 1956?



DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondukuponon); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Argentino.** Studenta Esperanta Centro, San Juan 267, Mendoza. Deziras korespondi pri Nord-Amerikaj dancoj.
- Aŭstralio.** Walter Goerisch, J 435, Yallourn-East, Victoria. 32-jara germana enmigrinto en Aŭstralio dez. kor. Esperante, angle aŭ germane kun Usona aŭ Kanada fraŭlino.
- Brazilo.** F-ino Maria Adelaide França de Paiva, Rua Floriano Peixoto 60 Barbacena (M.G.). Dez. kor., interŝ. PK, PM kun la tuta mondo.
- Brazilo.** F-ino Maria Aparecida de Sousa, Rua Dr. Pena 258, Barbacena (M.G.). Dez. kor., interŝ. PK, PM kun la tuta mondo.
- Francujo.** F-ino Annette Jabouille, 5 rue d'Orgemont, Argenteuil (S. & O.) Deziras korespondi kun ĉiuj landoj.
- Germanujo.** Erhard Teumer, Altenbekener Damm 20 (Sehenbehindertenschule), (20a) Hannover. Dez. kor. kun samprofesiaj pri instruado de vidmalfortaj infanoj.
- Italujo.** Emanuele Rossi, Viale Rapisardi 44, Catania. 22 junuloj dez. kor. kun usonanoj kaj kanadanoj, interŝ. PM, il. PK (naciaj kostumoj).
- Japanujo.** S-ino Kusumoto Ikuko, 153, 1-chome, Tamagawa Okusawa, Setagaya-ku, Tokio. 24-jara, lektoro de angla kaj usona literaturo dez. kor. kun usonanoj pri instruado de lingvoj, pedagogio.
- Japanujo.** F-ino Ikuyo Umejama, Samei, Sue-mura, Kuma-gun, Kumamoto-ken. 21-jara instruistino dez. interŝ. il. PK kaj PM.
- Veraj amulet-rememorigaĵoj de Afriko.** Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj vere protektas vin kaj donas al vi bonsorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la sendado rekte al vi kostas entute nur \$1.00. Aĉetu hodiaŭ, kiam ili ankoraŭ estas aĉeteblaj de: L. Heidelberg, Poste Restante, Kitwe, Northern Rhodesia, Africa.
- Letervesperon** aranĝas la Esperanto-Societo de Milwaukee je la 12-a de Januaro 1956. Dudek naŭ membroj, havante diversajn gradojn de Esperanta lerto, deziras korespondantojn pri diversaj temoj. Tial, ke ni povu ĝui grandan letervesperon, sendu leterojn, ilustritajn poŝtkartojn, ktp. Nepre respondos. Adresu: S-ro Jarvis E. Bush, Prez., Esperanto-Societo de Milwaukee, 3700 North 75th Street, Milwaukee 16, Wisconsin, Usono.

"La Nica Literatura Revuo". Aperas dumonate. Jarabono \$1.25. ... "celas publikigi, sub plaĉa formo, la plej belajn poemojn, originalajn aŭ tradukitajn, la plej artajn prozaĵojn, kaj per tiu alta stilnivele altiri samtempe la atenton de la laikoj kaj la kontribuadon de la esperantistoj. Sed ĝi volus ankaŭ vekti la intereson de pli larĝa publiko, prezentante jen bildojn pri kuriozaj moroj, maloftaj artaĵoj, homaj kaj naturaj pitoreskaĵoj, jen, tute simple, indan materialon por vivigi la klubvesperojn"...

Ĉefredaktoro: G. Waringhien. La nomoj de la Redakta Komitato, kiel *Regulo Perez, Reto Rossetti, Raymond Schwartz*, garantias la altkvalitecon de la "Revuo". La revuo estas abonebla pere de EANA. Sendu vian abonkotizon de \$1.25 al la Centra Oficejo tuj, por ke vi havu la "Revuon" de ĝia unua numero (kiu ĵus aperis).

THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "Connor Course" includes the following:

- (1) A lively text, "Esperanto: The World Interlanguage."
- (2) Eight "Vinylite" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "Study Guide" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of Mrs. Connor.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "Certificate of Achievement".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "Connor Course", as described above, will be sent postpaid for *only \$36*.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only \$6 more* for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order **NOW**:

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.